

Antaŭparolo

La sekva statuto priskribas la deziron de la fondintoj kaj la celojn de la fondaĵo. Ni, la fondintoj de la fondaĵo „Esperanto Internacia“ kaj ĝiaj amikoj havas la intencon agi por disvastigi la internacian lingvon “Esperanto”, speciale per informado kaj instruado de ĝi. Nia komuna deziro estas havi pli grandan lingvo-komunumon. Pli granda lingvo-komunumo signifas samtempe, ke oni uzos la lingvon pli ofte kaj ke ankaŭ la Esperanto-kulturo trovos pliajn ŝatantojn.

La fondaĵo plenumas siajn celojn per la rimedoj de la fondaĵo, per donacoj (amikaro), per donacoj de homoj, kiuj volas kontribui al la diversaj celoj kaj projektoj kaj per niaj laborfortoj. Ni firme deklaras ke ni volas ke la rimedoj estu uzataj plej ŝpare sen troaj administraj kostoj.

Statuto de la Fondaĵo „Esperanto Internacia“

§ 1 Nomo, Sidejo, Jura Formo

La fondaĵo nomiĝas „Esperanto Internacia“. Komence temas pri nejura fondaĵo sub la administro de la fondintoj, de la amikoj kaj de la estraro. Eventualajn jurajn devojn en tiu tempo plenumas por ĝi la germana fondaĵo Mondo. La fondaĵo rezervas al si la rajton akiri juran statuson en iu ajn momento. La provizora sidejo estas la loĝloko de la prezidanto de la fondaĵo.

§ 2 Bazaj principoj

La fondaĵo havas neŭtralan starpunkton rilate al mondkonceptoj. Baza principo por ĝia laboro tamen estas la universala deklaro pri homaj rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la deklaro pri la rajtoj de personoj, kiuj apartenas al naciaj, etnaj aŭ lingvaj minoritatoj (ĝenerala asembleo, rezolucio 47/135; 18a de decembro 1992). Ni opinias ke la ŝtatoj de la mondo devas aktive agadi kontraŭ la formorto de lingvoj, ĉar per la malapero de lingvo ankaŭ malaperas parto de la homa kulturo.

§ 3 Celoj de la fondaĵo

La fondaĵo ne estas profitcela. Ĝi celas agadi por la homaro. La rimedoj nur servu al la realigo de la celoj.

La celoj de la fondaĵo estas:

- Disvastigi la scion pri la internacia lingvo Esperanto en la mondo;
- Altigi la nombron de lernantoj de Esperanto en la mondo;
- Enkonduko de Esperanto kiel elektebla studobjekto en diversaj ŝtatoj de la mondo;
- Helpi al sciencaj esploroj pri Esperanto;

La fondaĵo realigas siajn celojn speciale per:

- Informado pri Esperanto (gazetaro, radio, televido, interreto k. a.);
- Instruado de Esperanto (universitataj kursoj, lernejoj kaj aliaj edukinstancoj);
- Instruvojaĝoj
- Aranĝo de seminarioj por trejni instruistojn;
- Aranĝo de seminarioj por trejni aktivulojn;
- Aranĝo de klerigaj seminarioj (lingva problemo, protekto de lingvoj)
- Informado pri Esperanto ĉe kulturaj kaj edukaj organizaĵoj kaj instancoj;
- Honorigo kaj premiado de modelaj agadoj sur diversaj kampoj.

La agado okazas tutmonde, sed la fondaĵo provas strategie agadi. Partoj de la mondo (aŭ landoj), en kiuj estas verŝajne ke per sama tempo- aŭ moninvesto oni povas havi pli da sukceso rilate al la celoj de la fondaĵo ricevu pli altan prioritaton.

Specialan atenton trovu kursoj en universitatoj, lernejoj kaj en la reto.

La fondaĵo povas ekzemple ankaŭ:

- subteni la partoprenon de personoj en Esperanto-kongresoj, renkontiĝoj aŭ -vojaĝoj (por altigi ilian lingvo- kaj instrukapablon);
- subteni agadojn rilate al la uzo de Esperanto, se tiuj agadoj stimulas plian lernadon kaj praktikadon de la lingvo (uzo de Esperanto en retpaĝoj; turismo aŭ aliaj).

La fondaĵo agas por la celoj laŭ la statuto pere de propraj agadoj aŭ pere de transdono de la koncernaj financrimedoj al aliaj organizoj, kiuj realigas la celojn laŭ la statuto. Se aliaj organizoj plenumas la celojn de la fondaĵo ili raportu pri la bonkvalita uzo de la mono kaj pri la realigo de la celoj al la estraro kaj al la konsilantaro.

§ 4 Utilo al la Socio / Senprofitceleco

La fondaĵo ne agas por havi profiton aŭ ekonomian gajnon. Rimedoj de la fondaĵo rajtas esti uzitaj nur por la celoj laŭ la statuto.

Neniu persono rajtas ricevi rimedojn de la fondaĵo sen kaŭzo, kiu rilatas al la celoj de la fondaĵo. Donacintoj kaj fondintoj ne ricevas monon kaze de malfondiĝo. Eventualaj salajroj aŭ repago de elspezoj estu laŭ la ĝenerale kutima alteco (laŭ la koncerna lando).

§ 5 Baza Kapitalo

La baza kapitalo de la fondaĵo estas komence 2000 EUR. Eventualaj pagoj al la kapitalo altigas la bazan kapitalon La baza kapitalo ne rajtas esti tuŝita.

§ 6 Donacoj

La estraro libere decidas pri la akcepto de donacoj. Ĝi ne ŝuldas klarigon.

§ 7 Interzonoj, donacoj kaj elspezoj

La interzonoj kaj alventantaj donacoj devas esti uzitaj por la diversaj celoj de la fondaĵo plejble rapide post la jaro kiam ili alvenis. 30 % de la gajno el kapitalinvesto (enspezoj el la investo minus elspezoj) rajtas esti aldonitaj al la kapitalo por garantii la protekton de la kapitalo kontraŭ inflacio. Eblas ŝpari parton de la rimedoj por iu konkreta celo (celrezervo).

Se iu donacanto deziras la aldonon de la koncerna donaco al la kapitalo, la fondaĵo respektas plene tiun deziron.

§ 8 Ŝpara administrado

La fondaĵo devas uzi la rimedojn efike kaj ekonomie bone. Ĝi havu taŭgan kaj klaran spezo-listojn kaj bilancon. La kalkuljaro estas la kalendara jaro.

Administrataj kostoj (financa administrado; kostoj de la estraro; oficejaj kostoj; salajroj pro administrado) ne superu 25 % de la liberaj rimedoj (enspezoj pro donacoj (amikaro); interezoj).

La membroj de la organoj de la fondaĵo laboras plene honorofice. Repago de kostoj eblas ene de la limoj de la buĝeto.

§ 9 Organoj

- (1) Organoj de la fondaĵo estas la estraro, la konsilantaro kaj la kunsido de la fondintoj.
- (2) La konsilantaro kaj la estraro povas decidi pri la fondo de eventualaj agad- aŭ labor-grupoj.

§ 10 Estraro

- (1) La estraro konsistas el tri ĝis kvin personoj.
- (2) La konsilantaro de la fondaĵo elektas la membrojn laŭ oficoj. Blokelekto eblas.
- (3) Minimuma aĝo por la aparteno al la estraro estas 18.
- (4) La estraro oficas dum 4 jaroj. La membroj de la estraro restas estraranoj ĝis kiam elektiĝas nova estraro.
- (5) Kaze de retiriĝo de estrarano, deklaro de malfido aŭ morto, la konsilantaro alelektas estraron por la resto de la periodo.
- (6) La komencan estraron nomas la fondintoj.
- (7) Estrarano ne nepre devas aparteni al la konsilantaro.
- (8) La estraro plenumas siajn taskojn kaj speciale:
 - atentas pri la gardo de la kapitalo de la fondaĵo;
 - prezentas la buĝeton kaj la spezialistojn;
 - decidas pri la uzo de la rimedoj kune kun la konsilantaro;
 - decidas pri la akcepto de novaj amikoj;
 - plenumas taskojn antaŭ ŝtataj instancoj;
 - prezentas la jaran laborraporton kaj eventuale pliajn raportetojn aŭ informojn pri la kuranta agado;
 - invitas al la kunsidoj de la konsilantaro kaj de la amikoj.
- (9) La membroj de la estraro havas samajn rajtojn.
- (10) La estraro povas decidi se iun kunvenon partoprenas minimume 2 estraranoj (se la estraro konsistas el 3 estraranoj) aŭ 3 estraranoj (se la estraro konsistas el 5 estraranoj). La kunsidoj de la estraro ĝenerale okazas rete. Decidojn oni povas fari ankaŭ per elektronika poŝto. La estraro protokolos ĉiun kunsidon.

§ 11 Konsilantaro

- (1) La konsilantaro estas la supera organo de la fondaĵo. Ĝi konsistas komence el 11 konsilantoj. Por ĉiuj 500 “amikoj de la fondaĵo” la kvanto altiĝas je 2 konsilantoj, sed ĝi ne superas la kvanton de 23 konsilantoj.
- (2) En la konsilantaro estu personoj, kiuj aktivas por la disvastigo de Esperanto kaj laŭeble havu la necesajn spertojn sur tiu kampo.
- (3) Konsilanto povas fariĝi ĉiu persono, kiu aĝas pli ol 18 jaroj.
- (4) La konsilantaron elektas la fondintoj de la fondaĵo, plej malfrue 2 jarojn post la oficiala fondodato.
- (5) La konsilantaro oficas dum 4 jaroj. La oficperiodo komenciĝas 6 monatojn post la enpostenigo de nova estraro. La membroj de la konsilantaro restas konsilantoj ĝis kiam elektiĝas nova konsilantaro.
- (6) Kaze de retiriĝo de estrarano, deklaro de malfido aŭ morto, la konsilantaro alelektas estraranon por la resto de la periodo
- (7) La konsilantaro kunvenas minimume unufoje jare. La kunsido povas okazi dum iu granda Esperanto-aranĝo aŭ pere de reta babil sistemo. Kaze de kunveno en Esperanto-aranĝo la estraro invitas almenaŭ du monatojn antaŭe kun prezento de la tagordo; la invito estas valida se ne pli ol 25 % de la konsilantoj kontraŭas ĝin. Kaze de reta kunveno sufiĉas invito 4 semajnojn antaŭe.
- (8) La konsilantaro:
 - fiksas la gvidajn liniojn de la fondaĵo,
 - fiksas eventualan administran ordon,
 - akceptas la buĝetplanon,
 - decidas pri la minimumaj donacoj por fariĝi “fondinto”, “amiko” aŭ dumviva amiko de la fondaĵo,
 - elektas aŭ malelektas estraranojn,
 - malnomumas fondintojn,
 - kontrolas la estraron,
 - decidas pri ŝanĝoj de la statuto,
 - alelektas konsilantojn por la resto de la periodo (en la kazo de ekŝiĝo).
- (9) La konsilantaro povas decidi bonorde, se iun kunvenon partoprenas minimume 50% de la konsilantoj post laŭstatuta invito. Se en la koncerna kunveno ne partoprenas la kvorumo oni tamen povas trakti la tagordon kaj formulas proponojn, pri kiuj poste decidas valida kunveno de la konsilantaro. Se la kunsidon ne partoprenas la minimuma kvanto, la estraro povas inviti al dua kunveno, kiu okazu nepre elektronike. Tiu kunsido estos valida se ĝin partoprenas pli ol 40 % de la konsilantoj. Se tiun elektronikan kunvenon ankaŭ ne partoprenas la sufiĉa kvanto, la estraro povas inviti al tria kunveno, kiu estos valida sendepende de la nombro de la partoprenantaj konsilantoj.
- (10) La konsilantaro decidas per plimulto. La sekvaj decidoj bezonas alian plimulton:
 - Malelekto de estrarano bezonas plimulton de 7/10 de la voĉoj.
 - Malnomumo de fondinto bezonas plimulton de 7/10 de la voĉoj
 - Ŝanĝoj de la statuto bezonas plimulton de 7/10 de la voĉoj
 - Eventuala malfondo bezonas plimulton de 9/10 de la voĉoj.

Decidoj pri la menciitaj punktoj nur estas validaj, se ĝin partoprenis minimume 70% de la konsilanto kaj se la kunveno de la fondintoj proponis la koncernan decidon.

La deziro pri statuta ŝanĝo aŭ malfondo devas esti antaŭanoncita en la invito al la kunsido. Por statuta celo sufiĉas la mencio de la koncerna paragrafo kaj la proksimuma vortumo de la dezirita ŝanĝo.

- (11) Ĉe voĉdono kalkuliĝas nur la donitaj voĉdonoj.

§ 12 Fondintoj

- (1) Por fariĝi fondinto oni pagas la minimuman fondodonacon, kiun fiksas la konsilantaro, al la baza kapitalo kaj krome oni devas deklari la deziron fariĝi fondinto. La fondintoj decidas en la posta kunveno pri la akcepto de novaj fondintoj. La unaj fondintoj difinas la altecon de la minimuma fondodonaco dum la unua periodo (inter la fondo kaj la unua kunsido de la konsilantaro).
- (2) “Fondintoj (ĝenerale) dumvive apartenas al la fondaĵo. Ili havas la samajn rajtojn kiel la amikoj de la fondaĵo aŭ dumvivaj amikoj.
- (3) La fondintoj elektas la konsilantaron.
- (4) La fondintoj proponas malnomumon de iu fondinto al la konsilantaro, se la koncerna fondinto pro gravaj kaŭzoj ne plu povas plenumi sian taskon (ekz. grava malsano; mensa malforteco k. a.). La koncerna fondinto post eventula malnomumo restas dumviva amiko de la fondaĵo.
- (5) La fondintoj malelektas konsilanton, se la koncerna konsilanto pro gravaj kaŭzoj ne plu povas plenumi sian taskon (ekz. grava malsano; mensa malforteco k. a) aŭ se ĝi ne plu plenumas siajn taskojn.

§ 13 Amikoj

- (1) Por fariĝi “amiko de la fondaĵo” oni pagas ĉiujare minimuman donacon. La altecon de la minimuma donaco difinas la konsilantaro. La originaj fondintoj difinas la altecon de la minimuma donaco por la unua periodo (inter la fondo kaj la unua kunsido de la konsilantaro).
- (2) La minimuman kotizon por fariĝi amiko, oni povas pagi mone aŭ per laboro (laŭ interkonsento kun la estraro)
- (3) Amikoj de la fondaĵo restas amiko ĝis la fino de la jaro en kiu ili lastfoje pagis la miniman kotizon aŭ en kiu ili lastfoje transprenis laborajn taskojn.

§ 14 Simpatiantoj

- (1) Ĉiu persono, kiu aĝas minimume 12 jarojn, povas fariĝi “Simpatianto de Esperanto” por subteni la fondaĵon per la membreco kaj eventuale ankaŭ per agoj.

- (2) Amikoj, kiuj ne plu donacas aŭ ne plu laboras, aŭtomate fariĝas “Simpatianto”.
- (3) Por resti “Simpatianto” necesas almenaŭ unu kontakto (telefone, rete, poŝte aŭ per alia komunikilo) kun la fondaĵo en periodo de 5 jaroj.
- (4) Malaliĝoj validas por la fino de la koncerna jaro, se la koncerna deklaro atingas la fondaĵon ĝis la 30-a de oktobro de la koncerna jaro. En alia kazo la malaliĝo validas nur por la sekvonta jaro.

§ 16 Celdonacoj / Subfondaĵoj

- (1) Se iu persono donacas por iu speciala celo la konsilantaro kaj la estraro respektas tiun deziron, se ĝi estas laŭstatuta.
- (2) Personoj povas fondi subfondaĵon se ili donacas minimume 10.000 EUR.
- (3) La donacanto povas mem difini la celon kaj la nomon de la subfondaĵo. La celo devas esti laŭstatuta kaj realigebla fare de la fondaĵo; krome la monrimedoj estu sufiĉaj por la koncerna celo (ekzemple subteno de la Esperanto-movado en iu speciala regiono, lando aŭ urbo, premiado de sukcesaj lokaj agantoj; okazigo de seminario pri loka agado). La kapitalo devas aperi en la bilanco en ekstra pozicio sub la nomo de la subfondaĵo. Ankaŭ en la elspezo / enspezolisto la sumoj aperu en aparta pozicio.
- (4) La fondintoj povas difini la celon de la subfondaĵo daŭre (laŭ donackontrakto) aŭ de jaro al jaro dum ilia vivo. La estraro akceptas la deziron se ĝi estas laŭstatuta kaj plenumbla.
- (5) Subfondaĵo pagas 10 % de la enspezoj pro interezoj al la fondaĵo “Esperanto Internacia”. La subfondaĵo devas mem kovri eventualajn administrajn kostojn de iu projekto.

§ 18 Subtenoj

Ĉiu povas peti ĉe la estraro subtenon por projektoj. Pri petoj, kiuj konformas al la statuto decidas la estraro kun eventuala diskuto en la konsilantaro. La estraro depende de la situacio povas peti fakulojn pri konsilo.

§ 19 Bonhavo ĉe malfondo

Kaze de malfondo de la fondaĵo la mono devas esti uzota por la celoj de la fondaĵo. Ĝi devas esti transdonita al iu asocio, kiu garantias pri tia uzo (eventuale per kontrakto). En la kunveno, kie oni decidas pri la malfondo oni ankaŭ devas decidi, kiu asocio ricevos la monon.

§ 20 Valideco de la statuto

La statuto validas post ĝia skriba akcepto de ĉiuj originaj fondintoj kaj la pago de la interkonsentita fondodonaco. Ĝis la enoficigo de la konsilantaro, plej malfrue ĝis 2 jaroj post la oficiala fondo eblas ŝanĝoj post skriba interkonsento de la originaj fondintoj.